AKCEPTITA
de la 10-a Kongreso de SEU-REU
la 28-an de decembro 1991

La nova versio de la Statuto
AKCEPTITA
de la Konferenco de REU
la 8-an de oktobro 1995,
Tjumeno

La amendoj en la Statuto de la socia organizaĵo "Rusia Esperantista Unio" estas registritaj en la Ministerio de Justico de Rusia Federacio la 16-an de januaro 1997.
Registra atesto № 1512.

STATUTO
DE LA SOCIA ORGANIZAĴO
“RUSIA ESPERANTISTA UNIO”

1. Celoj, taskoj kaj agadprincipoj de REU

1.1. La socia organizaĵo “Rusia Esperantista Unio” (REU) estas tutrusia socia unuiĝo, aganta sur la teritorio de plimulto de la subjektoj de Rusia Federacio. REU estas formo de kunlaboro por siaj membroj — adeptoj de la internacia lingvo Esperanto.

1.2. Celoj de REU estas:

- popularigo kaj disvastigo de la lingvo Esperanto;
- plifirmigo de la paco, evoluigo de la internacia kunlaboro en ĉiuj sferoj de la homa agado helpe de la lingvo Esperanto.

1.3. Konforme al la celoj REU starigas antaŭ si jenajn taskojn:

- organizado de informinterŝanĝoj pri instruado, disvastigo kaj praktika uzado de la lingvo Esperanto;
- trejnado kaj atestado de instruistoj de Esperanto;
- organizado de esperantistaj aranĝoj, inkluzive internaciajn (renkontiĝoj, seminarioj ks);
- kunordigo de planoj de amasaj aranĝoj, praktika, metodika kaj materiala helpo al ties organizantoj;
- organizado de servoj, garantiantaj kontentigon de la informaj, sciencaj, komunikaj, klerigaj interesoj kaj bezonoj de esperantistoj, speciale, pri ricevo de literaturo, de korespondaj adresoj, pri plialtigo de kvalifiko ks;
- eldonado de periodaĵoj kaj literaturo laŭ sia temaro en Esperanto kaj aliaj lingvoj konforme al la leĝaro pri gazetaro kaj aliaj amasinformiloj;
- kunlaboro kun ajnaj, inkluzive internaciajn, organizaĵoj pri demandoj de reciproka intereso;
- reprezentado de la interesoj de REU-membroj en internaciaj kaj landaj esperantistaj organizaĵoj, en ŝtataj kaj sociaj organizaĵoj.

1.4. Por efektivigi la statutajn celojn REU rajtas:

- libere disvastigi informojn pri sia agado;
- partopreni en ellaboro de decidoj de ŝtatpotencaj kaj municipaj organoj laŭ ordo kaj en amplekso, antaŭviditaj de la leĝaro;
- okazigi kunvenojn, mitingojn, demonstraciojn, manifestaciojn kaj pikedojn;
- fondi amasinformilojn kaj efektivigi eldonan agadon;
- reprezenti kaj defendi siajn rajtojn, justajn interesojn de siaj membroj kaj aliaj civitanoj en ŝtatpotencaj kaj municipaj organoj kaj sociaj unuiĝoj;
- efektivigi en plena amplekso la funkciojn, antaŭviditajn de la leĝoj pri sociaj unuiĝoj;
- pledi kun iniciatoj pri diversaj demandoj de la socia vivo, prezenti proponojn al ŝtatpotencaj organoj.

1.5. REU devas:

- observi la leĝaron de Rusia Federacio, la ĝenerale agnoskitajn principojn kaj normojn de la internacia juro, koncernantajn ĝian agadsferon, kaj la normojn, antaŭviditajn de ĉi tiu Statuto;
- ciujare publikigi raporton pri uzo de sia havaĵo aŭ garantii liberecon de konatiĝo kun la menciita raporto;
- ciujare informi la Ministerion de Justico de Rusia Federacio pri daŭrigo de sia agado kun indiko de la efektiva restadloko de la Estraro kaj donitaĵoj pri gvidantoj de REU en la amplekso de informoj, enigataj en la unuecan ŝtatan registroliston de juraj personoj;
- prezenti laŭ postulo de la Ministerio de Justico de Rusia Federacio decidojn de la gvidorganoj kaj funkciuloj de REU, kaj krome jarajn kaj jarkvaronajn raportojn pri sia agado en la amplekso de informoj, prezentataj al la impostaj organoj;
- allasi reprezentantojn de la Ministerio de Justico de Rusia Federacio ĉeesti aranĝojn, okazigatajn de REU;
- asisti al reprezentantoj de la Ministerio de Justico de Rusia Federacio por konatiĝo kun la agado de REU lige kun atingo de la statutaj celoj kaj observo de la leĝaro de Rusia Federacio.

1.6. En sia agado REU baziĝas sur la principoj de demokratio, internaciismo, respekto de tuthomaraj kaj ekologiaj valoroj kaj homaj rajtoj, libervoleco, egalrajteco, memregado kaj publikeco. REU estas politike neŭtrala unuiĝo.

1.7. REU agnoskas memstarecon de esperantistaj unuiĝoj ĉu en, ĉu ekster sia konsisto kaj strebas al konstruiva kunlaboro kun ili.

1.8. La laborlingvo de REU estas la internacia lingvo Esperanto. En necesaj okazoj povas esti uzataj aliaj lingvoj.

1.9. La tuta agado de REU estas efektivigata enkadre de la statutaj celoj kaj taskoj konforme al la aktuala leĝaro.

2. Membreco en REU

2.1. Membroj de REU povas esti fizikaj personoj kaj juraj personoj — sociaj unuiĝoj.

2.2. Membroj de REU povas esti fizikaj personoj — atingintaj la 18-jaran aĝon civitanoj de Rusia Federacio aŭ alia stato kaj personoj sen civitaneco, posedantaj, lernantaj aŭ

subtenantaj la lingvon Esperanto kaj agnoskantaj ĉi tiun Statuton. Aliĝon de fizikaj personoj al REU efektivigas la Estraro de REU au regiona organizaĵo surbaze de persona peticio.

2.3. Membroj de REU povas esti juraj personoj — ajnaj esperantistaj sociaj unuiĝoj, registritaj laŭ la ordo fiksita de la Leĝo. Aliĝon de juraj personoj — sociaj unuiĝoj al REU efektivigas la Estraro surbaze de skriba peticio de la gvidantaro de la jura persono — socia unuiĝo.

2.4. Esperantistoj estas liberaj elekti formon de aparteno al REU: ili povas aliĝi al REU, turnante sin ĉu al regiona organizaĵo, ĉu senpere al la Estraro de REU.

2.5. Membroj de REU rajtas:

- partopreni kun rajto de decida voĉo en la Konferenco de REU;
- elekti kaj esti elektitaj (havi elektitajn reprezentantojn) dum formado de la elektataj organoj de REU;
- partopreni en programoj kaj aranĝoj, organizataj de REU;
- turni sin kun demandoj kaj proponoj al la organoj kaj departementoj de REU, ricevi de ili helpon kaj konsilojn;
- uzi la havaĵon kaj la materialan bazon de REU;
- ricevi unuecmodelajn membrokartojn (juraj personoj — sociaj unuiĝoj — por siaj personaj membroj);
- gustatempe ricevi informojn pri la planataj aranĝoj kaj decidoj de la organoj de REU.

2.6. Membroj de REU devas:

- observi la Statuton de REU;
- regule en fiksita tempo pagi la membrokotizojn;
- spareme rilati al la havaĵo kaj la materiala bazo de REU;
- raporti pri la komisiata laboro.

2.7. Membreco en REU povas esti ĉesigita surbaze de: por la fizikaj personoj — persona peticio, por la juraj personoj — sociaj unuiĝoj — skriba peticio de la gvidantaro. Membro de REU povas esti eligita el la organizaĵo pro nepagado de la membrokotizoj aŭ alia grava malobservo de la Statuto de REU. Decidon pri la eligo akceptas la Estraro. Kontraŭ la decido pri la eligo oni povas apelacii al la plej proksima Konferenco de REU.

3. Organiza strukturo de REU

3.1. Al la konsisto de REU apartenas regionaj organizaĵoj, kies membroj efektivigas la celojn kaj taskojn, formulitajn en ĉi tiu Statuto. Regiona organizaĵo funkcias surbaze de ĉi tiu Statuto, kaj krome povas funkcii surbaze de sia Statuto, kiu ne kontraŭas la postulojn de ĉi tiu Statuto kaj fiksas kompetentecon, periodojn de funkciado kaj ordon de formado de la gvidorganoj de la organizaĵo.

3.2. Regiona organizaĵo de REU, kiu ne estas jura persono, observas jenajn postulojn:

- gvidorganoj de la regiona organizaĵo estas la Ĝenerala kunveno kaj la Estraro;
- la gvidorganoj de la regiona organizaĵo memstare solvas ĉiujn demandojn de sia agado, krom tiuj, kiujn ĉi tiu Statuto atribuas al la kompetenteco de REU;

- la Ĝenerala kunveno de la regiona organizaĵo estas kunvokata ne malpli ofte ol unu fojon en jaro;
- la Ĝenerala kunveno estas kvoruma, se ĝin ĉeestas pli ol duono de la membroj de la regiona organizaĵo;
- la Estraro de la regiona organizaĵo estas elektata de la Ĝenerala kunveno por ne pli ol dujara periodo;
- la Estraro estas kunvokata ne malpli ofte ol du fojojn en jaro;
- kunsido de la Estraro estas kvoruma, se ĝin ĉeestas pli ol duono de la estraranoj.

3.3. Gvidorganoj de REU estas la Konferenco kaj la Estraro de REU. Kontrol-revizia organo de REU estas la Kontrol-revizia Komisiono.

3.4. La Konferenco estas la supera gvidorgano de REU. Ĝi estas kunvokata de la Estraro ne malpli ofte ol unu fojon en du jaroj. Ĉe neceso laŭ decido de la Estraro aŭ laŭ postulo de ne malpli ol 20% de la membroj de REU povas esti kunvokita ekstervica Konferenco.

3.5. Delegitoj de la Konferenco de REU kun rajto de decida voĉo rajtas esti ĉiuj membroj de REU — fizikaj personoj kaj reprezentantoj de la juraj personoj — sociaj unuiĝoj, elektataj laŭ reprezentnormoj, fiksataj de la Estraro de REU. La Konferenco estas kvoruma, se ĝin ĉeestas pli ol duono de la elektitaj kaj anoncitaj delegitoj.

3.6. Al la ekskluzivaj funkcioj de la Konferenco apartenas:

- aŭskulto de la raporto de la Estraro, pritakso de ties laboro;
- aŭskulto de la raporto de la Kontrol-revizia Komisiono;
- akcepto de la Statuto de REU;
- elekto de la Prezidanto per sekreta alternativa voĉdono kaj de la prezidanto de la Kontrol-revizia Komisiono;
- laŭ eventuala decido de la Konferenco — elekto de Vicprezidanto;
- elekto de la Estraro kaj de la Kontrol-revizia Komisiono;
- solvo de demando pri reorganizo aŭ malfondo de REU.

Al la ceteraj funkcioj de la Konferenco apartenas:

- amendado de la Statuto de REU;
- akcepto de la Agadprogramo de REU por la periodo ĝis la sekva Konferenco de REU;
- konfirmo de la buĝeto de la Estraro por la periodo ĝis la sekva Konferenco de REU;
- fondo kaj malfondo de komisionoj, sekcioj, filioj, reprezentejoj kaj elekto de komisiitoj de REU, kaj konfirmo de decidoj de la Estraro pri fondo kaj malfondo de funkciaj departementoj.

3.7. Decidoj de la Konferenco estas akceptataj per simpla plimulto de la ĉeestantaj delegitoj, se ĉi tiu Statuto ne fiksas alian kondiĉon. Ĉe neceso la Konferenco povas transdoni al la Estraro parton de siaj funkcioj (krom la ekskluzivaj).

3.8. La funkcioj de ĉiuj elektitaj organoj de REU validas ĝis la sekva Konferenco de REU, t. e. por ne pli ol dujara periodo.

3.9. Ĉe neceso dum la periodo inter la Konferencoj de REU, laŭ decido de la Estraro aŭ laŭ propono de ne malpli ol 20% de la membroj de REU, estas okazigata skriba voĉdonado (referendumo), laŭ la Regularo pri ĝi, akceptata de la Konferenco de REU.

Skriba voĉdonado ne estas okazigebla pri demandoj, apartenantaj al la ekskluzivaj funkcioj de la Konferenco.

3.10. La Estraro de REU estas elektata por ne pli ol dujara periodo fare de la Konferenco de REU kaj raportas al ĝi. La Estraro estas kunvokata laŭbezone, sed ne malpli ofte ol unu fojon en jaro. Kvorumo kaj decid-akcepta ordo de la Estraro estas difinataj de ties Reglamento, konfirmata de la Konferenco de REU.

3.11. Al la funkcioj de la Estraro apartenas:

- ekde la ŝtata registriĝo — efektivigo de la rajtoj de jura persono;
- kunvoko de la Konferenco de REU;
- plenumo de decidoj de la Konferenco;
- formado de laborplano surbaze de la Agadprogramo de REU;
- konfirmo de la kalendaraj planoj de REU-aranĝoj;
- en necesaj okazoj ŝanĝado de la konsisto kaj gvidantaro de komisionoj, sekcioj, filioj kaj reprezentejoj de REU kun posta konfirmo de la ŝanĝoj en la plej proksima Konferenco de REU;
- kreo kaj likvido de funkciaj departementoj de REU (komisionoj ks) kun posta konfirmo en la plej proksima Konferenco de REU;
- kunlaboro kaj kontaktoj en la nomo de REU kun aliaj rusiaj kaj eksterlandaj organizaĵoj;
- operativa informado de la membroj de REU pri aktualaj demandoj de sia agado;
- membrigo al REU;
- akcepto de operativaj decidoj pri etataj, financaj kaj aliaj kurantaj demandoj.

3.12. Decidoj de la Estraro, krom tiuj pri la amplekso kaj tempolimoj por pago de membrokotizoj kaj pri reprezentnormoj por la Konferenco de REU, ne estas devigaj por la membroj de REU kaj havas rekomendan karakteron.

3.13. La Estraro estas gvidata de la Prezidanto de REU, kiu organizas la laboron de la Estraro, respondecas pri la havaĵo kaj reprezentas REU jure. Okaze de neceso liajn funkciojn plenumas la Vicprezidanto, elektata de la Konferenco kaj membranta en la Estraro.

3.14. La Kontrol-revizia Komisiono de REU estas elektata de la Konferenco por ne pli ol dujara periodo. La Kontrol-revizia Komisiono raportas nur al la Konferenco. Ĝi kontrolas ĉiujn agadsferojn de REU, la staton kaj registradon de monrimedoj kaj materialaj valoroj, ĝustan plenumon de decidoj de la Konferenco kaj la Estraro, laboron pri leteroj kaj proponoj laŭ demandoj, apartenantaj al la kompetenteco de REU.

4. Havaĵo de REU

4.1. REU povas havi kiel propraĵon: terparcelojn, domojn, konstruaĵojn, loĝfonduson, transporton, instalaĵojn, laborilojn, havaĵon de kultur-kleriga kaj saniga destino, monrimedojn, akciojn, aliajn valorpaperojn kaj ceteran havaĵon, necesan por materiala garantio de la agado de REU, difinita en ĉi tiu Ststuto.

4.2. Al la propraĵo de REU povas aparteni institucioj, eldonejoj, amasinformiloj, kreataj kaj akirataj per la rimedoj de REU konforme al ties statutaj celoj.

4.3. La havaĵo de REU estas formata surbaze de:

- aliĝkotizoj kaj membrokotizoj;
- libervolaj kotizoj kaj monoferoj de organizaĵoj kaj civitanoj;
- enspezoj de la okazigataj de REU prelegoj, ekspozicioj, loterioj, aŭkcioj, studkursoj, koncertoj kaj aliaj aranĝoj;
- profitoj de eldona kaj alia entreprena agado de REU kaj ties specialigitaj departementoj;
- aliaj enspezoj, ne malpermesitaj de la leĝo.

La proprietulo de la havaĵo, formita el la enspezoj, antaŭviditaj de ĉi tiu Statuto, estas REU kiel tuto. La regionaj organizaĵoj, funkciantaj surbaze de ĉi tiu Statuto, rajtas operative administri la havaĵon, disponigitan al ili laŭ decido de la Estraro de REU. Profitoj de entreprena agado de REU ne povas esti redistribuataj inter membroj de REU kaj estas uzataj nur por atingo de la statutaj celoj.

4.4. REU deponas la monrimedojn en bankaj kontoj, malfermataj laŭ decido de la Estraro.

4.5. REU rajtas uzi bankan krediton. REU povas fari pagatajn servojn al la loĝantaro kaj organizaĵoj pere de kreataj mastrumaj organizaĵoj, havantaj la rajtojn de jura persono.

4.6. En la elspezoplanon de REU povas esti enigataj:

- elspezoj por akiro, luado kaj uzo de la nemovebla havaĵo;
- elspezoj por akiro de necesaj instalaĵoj, laboriloj, materialoj;
- elspezoj por la eldona agado;
- financado de la programoj kaj aranĝoj de REU;
- salajrado de la etataj funkciuloj de REU kaj de personoj dungataj laŭ laborkontraktoj;
- kotiza partopreno en financado de aranĝoj, okazigataj de aliaj organizaĵoj;
- formado de specialaj fondusoj de REU;
- oficvojaĝaj, poŝtaj kaj aliaj kurantaj elspezoj;
- asignoj al aliaj organizaĵoj, inkluzive tiujn por bonfaraj celoj.

5. Jura stato de REU

5.1. La socia organizaĵo “Rusia Esperantista Unio” estas jura persono ekde la ŝtata registriĝo. Ĝi ĝuas ĉiujn rajtojn de jura persono, antaŭviditajn de la leĝaro. Speciale, REU rajtas malfermi bankajn kontojn, krei mastrumajn asociojn, societojn kaj aliajn mastrumajn organizaĵojn, subskribi kontraktojn kaj fari negocojn (inkluzive internaciajn) ks.

5.2. REU ne respondecas pri sindevigoj de siaj membroj, same kiel ĝiaj membroj ne respondecas pri sindevigoj de REU.

5.3. La restadloko de la Estraro de REU estas la urbo Moskvo.

5.4. REU havas sian leterformularon, angulan stampon kaj rondan sigelon kun sia nomo en du lingvoj (la rusa kaj Esperanto) kaj emblemo (kvinpinta stelo kun la litero “E” meze).

5.5. En REU estas uzata la internacia simbolaro de Esperanto: la verda kvinpinta stelo, la verda flago kun verda kvinpinta stelo sur blanka kvadrato en la maldekstra supra angulo. REU povas ankaŭ havi propran simbolaron, konfirmatan de la Konferenco. La

simbolaro de REU estas ŝtate registrenda laŭ la ordo, fiksita de la leĝaro de Rusia Federacio.

5.6. Reogranizo de REU estas efektivigata laŭ decido de la Konferenco per plimulto de voĉoj ne malpli ol 2/3 de la ĉeestantaj delegitoj. La havaĵo de REU transiras post ties reorganizo al la novaj juraj personoj laŭ la ordo, antaŭvidita de la Civila Kodo de Rusia Federacio.

5.7. Malfondo de REU estas efektivigata:

- laŭ decido de la Konferenco per plimulto de voĉoj ne malpli ol 2/3 de la ĉeestantaj delegitoj;
- laŭ juĝa ordo.

La havaĵo, restinta rezulte de la malfondo de REU, post kontentigo de pretendoj de la kreditoroj estas direktata por la celoj, antaŭviditaj de la Statuto de REU. Decidon pri uzo de la restinta havaĵo la malfonda komisiono publikigas en gazetaro. La decido pri la malfondo de REU estas komunikata al la Ministerio de Justico de Rusia Federacio por eligi REU el la unueca ŝtata registrolisto de juraj personoj.

5.8. REU konservas dokumentaron pri la persona (etata) konsisto kaj okaze de malfondo transdonas ĝin al la ŝtata arkivo laŭ la establita ordo.

5.9. Ĉi tiu Statuto estas amendata de la Konferenco de REU per plimulto de voĉoj ne malpli ol 2/3 de la ĉeestantaj delegitoj, aŭ per skriba voĉdonado.